## Uitnodiging 35e jaarlijkse ledenvergadering

Alle leden van Esperanto Nederland worden uitgenodigd voor de jaarlijkse ledenvergadering die plaatsvindt op zaterdag 11 april 2026.

**Plaats:** De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511AP Utrecht.

**Tijdstip:** Aankomst vanaf 13.00 uur.

De vergadering begint om 13.15 uur.

Een lid mag maximaal 2 andere leden vertegenwoordigen, als bij aanvang van de vergadering de ondertekende machtigingen zijn overhandigd.

Het activiteitenverslag, de financiële verslagen, de begroting en het werkplan staan op de website. Papieren exemplaren kunnen worden opgevraagd bij de secretaris na 1 maart 2026.

**Lezing:** Na de vergadering houdt dr. Luis Miguel Rojas-Berscia, assistent professor in Spaanse en Latijns-Amerikaanse taalkunde, een lezing onder de titel **“Preter Esperanto: dekoloniigitaj kaj dekonstruitaj rigardoj”**

Rob Groeneveld,

Secretaris Esperanto Nederland

## Invito al la 35-a jarkunveno

**Plaats:** De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511AP Utrecht.

Ĉiuj membroj de Esperanto Nederland estas invititaj al la membrokunveno kiu okazos sabate la 11-an de aprilo 2026.

**Loko:** De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht.

**Tempo:** Alveno ekde la 13:00 horo.

La kunveno komenciĝos je la 13:15 horo.

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

Agadraporto, financaj raportoj, buĝeto kaj laborplano aperos en la retejo. Paperajn ekzemplerojn membro povos peti de la sekretario post la 1-a de marto 2026.

**Prelego:** Post la kunveno okazos prelego de d-ro Luis Miguel Rojas-Berscia, asistanta profesoro de hispana kaj latinamerika lingvistiko, titolita **“Preter Esperanto: dekoloniigitaj kaj dekonstruitaj rigardoj”**

Rob Groeneveld,

Sekretario de Esperanto Nederland.

ESPERANTO NEDERLAND

# **TAGORDO por la 35a ĝenerala kunveno** de Esperanto Nederland,

okazonta la 11-an de aprilo 2026 – de la 13.00 h en la ejo De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

Agadraporto, financaj raportoj, buĝeto kaj laborplano aperos poste en la retejo. Paperajn ekzemplerojn membro povos peti de la sekretario post la 1-a de marto 2026.

**Alveno** ekde 13.00 h

1. **Malfermo** de la ĝenerala kunveno je 13.15 h.
   Rememoro de la forpasintaj membroj
   Nomumi du personojn por la kalkulado de la voĉdonoj.
2. **Fikso de la tagordo**
   Estas eble ŝanĝi la tagordon.
3. **Protokolo pri la 34-a ĝenerala kunveno en 2025** (teksto aperis en Fenikso kaj en la retejo)
4. **Envenintaĵoj**
5. **Komunikoj**
   Sub ĉi tiu punkto eblas komuniki ion al la membroj.
6. **Agadraporto pri 2025**
7. **Financa jarraporto pri 2025**
   7.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono
   7.2. Rezultkonto pri 2025 kun klarigoj
   7.3. Bilanco je 31-12-2025
8. **Proponoj**
   8.1. Propono de la estraro: fiksi la kotizojn por 2027.
   La estraro proponas plialtigi la kotizon por membroj pli ol 30-jaraj al €45 jare kaj ne ŝanĝi la kotizon de membro ĝis 30-jara (€20) nek la kotizon de samhejmano (€15).
   8.2. Buĝeto kaj Laborplano por 2027
   8.3. Strategia plano 2026 - 2031 (’Beleidsplan’)
9. **Elektoj**
   9.1. Elekto de estraranoj
   9.2. Kaskontrol-komisiono
   La kaskontrol-komisiono por la jaro 2025 konsistas el Mariska de Jonge kaj Peter Ebenau. Rezerva membro estas Ronaldo Nobel. Nova membro por la jaro 2026 estas serĉata.
   9.3. Komitatano A ĉe UEA
   Ebla kandidato bonvolu kontakti la estraron.
   9.4. Elekto de membroj de la Arbitracia Komisiono
   *(Memorigo pri la membroj de la Arbitracia Komisiono: Anneke Schouten-Buijs (2025-2028), Hiddo Velsink (2025-2028) kaj Johan Swenker (2023-2026))*.
10. **Fenikso**
11. **Informado pri diversaj temoj**
    11.1. Kultura tago
    11.1.1. 2026 en Veghel
    11.1.2. 2027 en Wolvega
    11.2. Studosemajnfinoj
12. **Jubileantoj**

12.1. Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran membrecon.
12.2. Ni mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio.

13. **Verloren van Themaat-premio**
    La ĵurio anoncas la rezulton pri la jaro 2025.

14. **Ronddemandado**

15. **Fermo**

Rob Groeneveld, sekretario

Zoetermeer, la 25-an de januaro 2026.

Tagordo punkto 3

# Protokolo de la 34a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland

*Dato: la 10a de majo 2025.*
*Loko: De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht.*
*Tempo planita: ekde la 13:15a horo.*
*Ĉeestis la estraro: Marc van Oostendorp, prezidanto, Rob Groeneveld, sekretario, Loes Demmendaal, kasisto, Ineke Emmelkamp,estrarano, Peter van Noorden, estrarano.*
*Ĉeestis 18 membroj kaj unu gasto.*
*Envenis 8 mandatoj.*
*Prezidis: Marc van Oostendorp.*
*Protokolis: Rob Groeneveld.*

1. **Malfermo de la ĝenerala kunveno**
   - La prezidanto malfermis la kunvenon.
     La ĉeestantoj ekstaris kaj honoris la forpasintajn membrojn dum momento da silento:
     S-ino Ans Heijstra-Valkering, S-ino Jorine Captein, S-ro Carel Boerlijst, S-ino Baukje Muizelaar-Borger, S-ro Kees Bos, S-ro Piet Schuil, S-ro Ad Peeraer, S-ro J. De Bock kaj S-ro Franklin Van Zoest
   - La voĉdonadon kalkulos Ronaldo Nobel kaj Hiddo Velsink

2. **Fikso de la tagordo**
   La estraro proponas ŝanĝi la tagordon tiel ke punkto 9.4 antaŭensoviĝu al nova punkto 8.4, ĉar ĝi estas propono kiu devas esti traktita kun la aliaj proponoj.
   La estraro proponis enmeti novan punkton 9.4 Elekto de membroj de la Arbitracia Komisiono. La Arbitracia Komisiono povas decidi pri konfliktoj ene de la asocio. Du membroj de la Komisiono demisios en 2025. Bonŝance ili ambaŭ pretas esti reelektitaj.
   La estraro proponis ŝanĝi la tagordon per tio ke ni unue traktu punkton 13 pri la Verloren van Themaat-premio, post la pritrakto de la tagordo. La premiotoj ĉeestas. Ili devas forlasi nian kunvenon ĉar ili devos poste hodiaŭ aperi en du koncertoj en Frislando.
   La kunveno akceptis la ŝanĝojn de la tagordo.

   **Punkto 13 estis traktita ĉi tie** (vidu poste en la protokolo)

3. **Protokolo de la 33a ĝenerala kunveno**
   Ne estis rimarkigoj pri la protokolo. La prezidanto dankis Rob Groeneveld, kiu faris ĉi tiun protokolon.

4. **Envenintaĵoj**
   Anoncis sian neĉeeston: Anneke Schouten-Buijs, Ralph Schmeits, Johan kaj Jannie van der Hoek, Foppe-Klaas Hovinga, Tonnie van Kessel, Pieter Engwirda (kiu estas grave malsana) kaj Alfonso Pijnacker (en malsanulejo).


5. **Komunikoj**
   Ne estis komunikoj.

6. **Agadraporto pri 2024**
   Ne estis demandoj aŭ rimarkigoj pri la agadraporto.

7. **Financa jarraporto pri 2024**

   **7.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono**

   Mariska de Jonge laŭtlegis la raporton:



**Kaskontrolo 2024, Esperanto Nederland**

Je la 17a de aprilo 2025 ni kontrolis la financan jarraporton de Esperanto Nederland. Niajn demandojn respondis la estrarano pri financoj, Loes Demmendaal.

Klarigojn vi legas en la financa jarraporto.

Ni konstatas diferencon ĉe la enspezoj de la rezulto 2024 kaŭzita de rondigoj. Ni rekomendis korekti la superrigardon por la jaro 2024 kaj estonte ne uzante rondigojn

Al la membroj, estantaj en la ĝenerala membro-kunveno ni petas malŝarĝigi la estraron.

Ans Bakker – ten Hagen Mariska de Jonge

[redacted]

2025-04-17 Capelle aan den IJssel

**7.2. Rezultkonto pri 2024 kun klarigoj**

Loes Demmendaal: En la rezultkonto nun la nombroj estas sen rondigoj, do ne plu estas kalkuleraroj. Nia rezulto ĉijare estas pozitiva rezulto, kaj tio longe ne okazis. La planitaj elspezoj estis €16 400 kaj la efektivaj elspezoj estis €10 201,67 kaj tio okazis ĉar la studosemajnfinoj donis pozitivan rezulton. Estis multaj donacoj kaj multaj partoprenantoj en la semajnfinoj. Aldone ni plialtigis la prezojn. Ankaŭ la Kultura Tago liveris pozitivan rezulton. Entute ni havis pozitivan rezulton de €51,86.
Ne estis demandoj.

**7.3. Bilanco je 31-12-2024**

En la bilanco vi vidas ke la kapitalo pligrandiĝis per tiu €51,86. Por la katedro ni sukcesis akiri €5054.
Ni ricevis lastjare dufoje €1500. Unu donaco estas por nederlandanoj kiuj havas financajn problemojn rilate la studosemajnfinojn kaj la alia helpfonduso estas por kulturaj aktivaĵoj.
Ne estis demandoj. La prezidanto petis la kunvenon malŝarĝi la estraron. La kunveno aplaŭdis.

8. **Proponoj**

**8.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2026. La estraro proponas plialtigi la jaran kotizon por membroj per 1,50 eŭroj al 41,50 eŭroj. La kotizoj de samhejmanoj kaj membroj ĝis 30-jaraj restos senŝanĝaj.**

Por malpliigi eventualan deficiton la estraro proponis plitaltigi la kotizon por membroj per la inflacio de septembro 2023 al septembro 2024 de 3,45 procentoj. Tio rezultigas ŝanĝon de 1,50 eŭroj.
La kunveno akceptis la proponon.

**8.2. Buĝeto kaj laborplano 2025 (ŝanĝita) kaj 2026**

La antaŭe proponita buĝeto por 2025 enhavis deficiton de €7510. Baze, la estaro decidis ke la studosemajnfinoj kaj la Kultura Tago devas pagi sin mem. Ne necesas ke ili havu profiton, sed ili ne havu deficiton. La nova propono reduktas multajn elspezojn, tiel ke estas antaŭvidita deficito de €1245. Por la jaro 2026 la propono enhavas deficiton de €1885. Ni ne scias ĉu la junularo bezonas monon. La jara kontribuaĵo por la biblioteko de la Universitato de Amsterdamo (UvA) estos nuligita. Estis demando ĉu la elspezo por la junularo estas necesa, ĉar la junularo ne plu aktivas. La prezidanto respondis ke la junularo reekaktivis. Ne estas konate ĉu ili bezonos monon. La estraro ankaŭ proponas redukton de la sumo pagota al IISG. La donacoj en la buĝeto por 2026 jam estas ricevitaj. Arjen-Sjoerd de Vries: kio okazos kiam estos deficito, ĉar ne sufiĉe da partoprenantoj ĉeestis studosemajnfinon?
Loes Demmendaal: Ni petas vin buĝeti sen deficito, sed se malgraŭ viaj klopodoj kiel organizantoj estos deficito, la asocio pagos.
La prezidanto: certe por ni la studosemajnfinoj estas tre gravaj. Ĉiam eblos ŝanĝi la buĝeton por 2026 se strukture ne venas sufiĉe da partoprenantoj.
Bert de Wit: Utilas memorigi el la pasinteco ke kiam FLE komencis la studsemajnfinojn en la okdekaj jaroj, venis multaj membroj al FLE per la studosemajnfinoj. Do tio subtenas la argumenton ke oni ne tro postulu, ke ne estu deficito.
Loes: ni ne postulas nulan saldon, ni buĝetas nulan saldon. Kontraŭ la propono estis du, sindetenoj tri. La resto estis por la propono de la estraro, kiu estis akceptita.

**8.3. Plano por informado**

La estraro ne havas proponon pri informado. Ni laboris por la nova retejo. Se iu havas energion labori pri la plano, kontaktu nin. Ni laboros pri la plano en 2025 kaj 2026.

**8.4. Ŝanĝo de la Regularo**

La estraro proponis ŝanĝi la Regularon (Huishoudelijk Reglement) jene:
"Artikel 26.4. *Het bedrag van de prijs wordt jaarlijks vastgesteld als onderdeel van de begroting."*
Post zorga tralaborado de la buĝetoj por 2025 kaj 2026, la estraro konstatis, ke la Verloren van Themaatprijs prenas relative grandan porcion de la membrokotizoj, kiu povus esti pli utile uzita aliloke. La premio daŭre ekzistos, sed la sumo estos fiksita en la jara buĝeto.
La kunveno akceptis la proponon.

9. **Elektoj**

9.1. **Estraro**

La prezidanto: La kasisto Loes Demmendaal bedaŭrinde demisias. Ŝi lernis Esperanton antaŭ 60 jaroj. La lingvo kaj la movado estas parto de ŝia vivo. Ŝi okupis diversajn rolojn: ĉe UEA, FLE kaj Esperanto Nederland. La laboro de Loes por nia asocio estas netakseble granda. Dum la lastaj jaroj ŝi plenumis la rolon de kasisto bonege.
Ineke transdonis donacon al Loes. La donaco ne estas por Loes, sed ĝi estas kontribuaĵo al War Child, organizaĵo kiu estas proksime al la koro de Loes.
La estraro proponas Kees Neeft kiel novan kasiston.
La prezidanto Marc van Oostendorp demisias kaj estas reelektebla. Peter van Noorden ankaŭ demisias kaj estas reelektebla.
Okazis elektoj. La komitato por la elektoj, konsistanta el Ronaldo Nobel kaj Hiddo Velsink, anoncis la rezultojn:
Marc van Oostendorp jes 25 ne 0 sindetenoj 1
Peter van Noorden jes 26 ne 0 sindetenoj 0
Kees Neeft jes 25 ne 0 sindetenoj 1
La prezidanto: ni ĉiam serĉas kandidatojn por la estraro. Se iu interesiĝas, tiu kontaktu unu el ni por la venonta jaro.
Kees Neeft sidiĝis apud la aliaj estraranoj.
(*Memorigo pri la estraraj periodoj:*
*Marc van Oostendorp 2025-2028 - dua periodo*
*Kees Neeft 2025-2028 - unua periodo*
*Peter van Noorden 2025-2028 - dua periodo*
*Ineke Emmelkamp 2024-2027 - dua periodo*
*Rob Groeneveld 2024-2027 - unua periodo*)

**9.2. Kaskontrol-komisiono**

La kaskontrol-komisiono por la jaro 2024 estis Mariska de Jonge kaj Ans Bakker-ten Hagen. Rezerva membro estis Peter Ebenau. Kiel rezerva membro por la jaro 2025 estis elektita Ronaldo Nobel. La kaskontrol-komisiono por la jaro 2025 konsistas el Mariska de Jonge kaj Peter Ebenau.

**9.3. Komitatano A ĉe UEA**

Kvankam ni provis trovi iun, ni ne havas kandidaton. Ni daŭre serĉas kandidaton.

**9.4. Elekto de membroj de la Arbitracia Komisiono**

La estraro proponis reelekti Anneke Schouten-Buijs kaj Hiddo Velsink kiel membrojn de la Arbitracia Komisiono.
La komisiono ricevis 26 voĉdonilojn. Por Anneke estis 26 por, neniu sindeteno, neniu kontraŭ, por Hiddo 26 por, neniu sindeteno, neniu kontraŭ.
Do, Anneke Schouten-Buijs kaj Hiddo Velsink estis reelektitaj kiel membroj de la Arbitracia Komisiono.

10. **Fenikso**

La prezidanto diris, ke la estraro estas tre kontenta pri la nova redakcio de Fenikso; ĝi estas ĉiufoje tre bela revuo.
Paweł Fischer-Kotowski**:** mi laboras por Fenikso kune kun Thijs van Viegen, kiu hodiaŭ ne povas ĉeesti. Ni nun laboras pri la numero 3. Ĉu estas demandoj?
Ineke: kial vi havas malfruiĝon?
Paweł: mi transloĝiĝis komence de la jaro kaj havis kelkajn problemojn pro tio.
Ineke: ĉu vi povus indiki en la antaŭparolo kial Fenikso malfruiĝis? Membroj scivolas kiam aperos Fenikso kaj ne ŝatas se ĝi longe ne aperas.
Iu membro volas scii kiom da homoj legas la retan version de Fenikso. Respondo: tion povus respondi la reta redakcio. Sed post monato Fenikso estas rete alirebla ankaŭ por nemembroj.

11. **Informado pri diversaj temoj**

**11.1. Kultura tago**

Ĉu estas informoj pri la Kultura Tago?
Tiny Droge: jam estas kelkaj informoj en la januara kaj februara numero de Fenikso. Feliĉe ne multe ŝanĝiĝis. La lasta dato por aliĝo estos la 1a de junio. Ni havas kontakton kun indonezia 'Toko' kiu prizorgos la vespermanĝon en De Sociëteit, la loko kie ni komencos kaj tagmanĝos. La aliĝilo estas en la retejo.

**11.2. Studosemajnfinoj**

La venonta studosemajnfino okazos de la 7a ĝis la 9a de novembro en Krikkenhaar.

An Olijslagers: ni organizos ankaŭ studosemajnfinon en Belgio, kiu okazos de la 20a ĝis la 22a de februaro 2026. Ankaŭ nederlandanoj estas bonvenaj. En Svedio oni organizos similan studosemajnfinon.

**11.3. Informoj pri la nova retejo de Esperanto Nederland**

Ineke: la nova retejo estas preskaŭ preta. Ĉiusemajne grupo kunvenos por pritrakti la retejon.
Bert: kial la agendo en la retejo montras tiom da eventoj? Ekz-e la Amsterdama Rondo nur povas enmeti tre malgrandan anoncon.
Ineke priparoligos tiun problemon en la grupo.
Kees: mi havas rimarkon pri la Goslinga-kolekto. Ĝi estas iom fuŝa.
Ineke: ni ordigis ĝin, bitigis kelkajn interesajn objektojn kaj metis ilin en la retejon. La kolekto estas historia tre granda kolekto ĉe UEA, Esperanto Nederland donacis ĝin. Por kelkaj homoj ĝi eble estas interesa.

12. **Jubileantoj**

**12.1. Ni honoras la membrojn kiuj festas sian 50-jaran membrecon**

Estas du membroj kiuj festas sian 50-jaran membrecon, nome s-ino Hanny Stam-Ultee kaj s-ro Freek Stam, el Koog aan de Zaan. Ili ricevos jubilean gratuldokumenton.

**12.2. Ni mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio**

Kees Neeft aliĝis antaŭ 25 jaroj al Esperanto Nederland. Ni transdonis al li gratulkarton.

13. **Premio Verloren van Themaat**

La raporto de la ĵurio, prezentita de la prezidanto: La premio Verloren van Themaat estas distingo por homoj kiuj aktivas por altiri atenton al Esperanto en la nederlandaj amaskomunikiloj. Ni ĉiuj scias, kiom grava tio estas. Neniu eklernas Esperanton tute hazarde, oni devas iel trovi ĝin. En pasintaj jaroj la premio estis aljuĝita al diversaj personoj kiuj kontribuis al tiu celo per plej diversaj rimedoj. Pasintjare ĝi estis aljuĝita al profesoro Gobbo kaj la jaron antaŭe al Foppe-Klaas Hovinga. Sed la ĉi-jare premiitaj estas vere elstaraj. Temas pri du personoj kiuj senĉese sukcesas direkti la publikan atenton al Esperanto, ĉiam en pozitiva kaj kreema maniero: Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer (la kunveno aplaŭdis), en niaj rondoj konataj kiel Kajto. Estas pli da muzikistoj en Esperantujo sed malmultaj uzas sian muzikon tiel konsekvence por disvastigi nian lingvon. Kajto faras tion efike, kantante ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en aliaj lingvoj. Per tio ili atingas publikon kiu eble neniam aŭdis pri Esperanto kaj tiu publiko malkovras ĝin nature, sen devigo. Ili estis intervjuitaj de la revuo Friesland Post kaj estis reprezentitaj en retpaĝoj de la Omrop Fryslân kun klara mencio de Esperanto. Jam dum jardekoj Ankie kaj Nanne ne nur donacis sian muzikan talenton, sed ankaŭ siajn koron kaj animon. Kun profunda respekto por la riĉeco de la frisa kulturo kaj la internacia lingvo ili sukcesis krei ponton inter lokeco kaj tutmondeco, inter tradicio kaj novigo. Sub la nomo Kajto ili prezentas ekde la malfruaj okdekaj jaroj kantojn artismajn kaj samtempe popularajn. Ili enmuzikigis verkojn de granduloj de la esperanta literaturo Auld, Baghy kaj Thorsen kaj ili revivigis tiujn vortojn per melodioj kiuj tuŝas la koron. Iliaj albumoj, inter kiuj Procesio multkolora, Tohuvabohuo kaj aliaj fariĝis fundamentaj en la esperanta kantaro. Sed ne nur per koncertoj ili inspiras generaciojn senti sin parto de viva kaj krea komunumo. Ili kreas spacon por kuneco, por partopreno, por vivanta kulturo. Tial kun granda ĝojo kaj profunda dankemo ni hodiaŭ aljuĝas al Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer la Premion Verloren van Themaat. Ili estas veraj pontfarantoj inter lingvoj, kulturoj kaj homoj, elstaraj ambasadoroj de la du veraj internaciaj lingvoj: Esperanto kaj muziko (la kunveno aplaŭdis).
Ankie diris: ni volas danki vin kvin kaj vin ĉiujn pere de kanto. Nanne: ni volas kanti la kanton "Ĉi tiu tago". Ĉi tio estas ege speciala tago, ankaŭ por ni. En la tuta eterneco nur estas unu tago: hodiaŭ. La kanto estis kantita en Esperanto, la frisa, la nederlanda kaj denove en Esperanto.
Ankie diris: vi donacis ion al ni, sed mi volas donaci ion al vi: biologiajn semojn.
Nanne diris: ni ne vendas sufiĉe da kompaktdiskoj. Antaŭ la korona periodo ni aĉetis multajn kompaktajn diskojn kaj nun ni ne povas vendi ilin. Vi povas preni la diskojn kaj ankaŭ doni ilin al aliaj personoj, ne-esperantistoj. Ĝi estas la KD 'Duope'.
Ankie: ni havas ankoraŭ du koncertojn hodiaŭ, do bedaŭrinde ni devas forlasi vin, sed denove multan dankon, estas granda honoro.

14. **Ronddemandado**

Jos Wichmann: amiko mia estas instruisto en meza lernejo. Li proponis ke mi venu al lia lernejo foje kaj parolu pri Esperanto. Kiu volas iri kune kun mi?
Marc: tio estos en la proksimeco de Nimego, do mi povos iri kun vi.
Jos: mi skribos al vi.
Katalin Kováts: kiu volas fari ekzamenon en Esperanto?
Marc: ĉu vi povas diri pli?
Katalin: estos pluraj ebloj fari ekzamenon en Esperanto, en 3 aŭ poste en 4 niveloj. Speciala defio estas, trapasi la ekzamenon C2. Pluraj jam faris tion, sed nemultaj nederlandanoj. Marc kaj Paweł kunlaboras por tiu ekzameno. Nun ankaŭ estos konkurso por elekti la plej bonan reganton de Esperanto en unu lando surbaze de la ekzameno C2. Povas gajni la 3 plej bonaj sukcesintoj el tri diversaj landoj. Baldaŭ estos 3000 diplomitoj laŭ la KER-reguloj. Tiun nombron ni povos montri al la ekstera mondo.
Bert: mi havas malnovajn ekzemplerojn de la ekzamenoj de FLE. Kiu interesiĝas pri tiuj?
Katalin: mi interesiĝas.
Iu alia demandis: ĉu Esperanto Nederland daŭrigu la konton en X (antaŭe: Twitter)? La prezidanto: ne.

Rob: kiu volas reprezenti nian asocion dum la Movada Foiro en la UK en Brno? Vi ricevos numerojn de Fenikso kaj alian materialon.
An Olijslagers respondis ke ŝi volas fari tion.
Hiddo sugestis senkostan germanan alternativon por Zoom.

15. **Fermo**
La prezidanto dankis la ĉeestantojn kaj fermis la kunvenon.

**Zoetermeer, la 11an de januaro 2026.**

Rob Groeneveld,
sekretario.

Tagordo punkto 6

**Agadraporto de Esperanto Nederland pri 2025**

## 1. Banko/kapitalo

Esperanto Nederland havis gajnon de la kapitalo en 2025 de € 3.396.
La ĉefa kialo estas pli da donacoj ol antaŭvidite, pozitiva rezulto ĉe la kultura tago en Alkmaar, nur 4 fojojn apero de Fenikso kaj erare nefarita amortizo de la stoko pri informado.
La propra kapitalo de la asocio estis je la 31a de decembro 2025: € 89.838.
La gajno estas inkluzive la kostojn por la Amsterdama katedro je € 2.000.
La rezervo 'Katedro Amsterdam 2019-2028' estis je la 31a decembro 2025:
€ 9862.
Kiel sekureco en kazo de malsano aŭ io simila, ankaŭ Ralph Schmeits estas rajtigita por bankaj aferoj.

## 2. Asocio – estraro kaj membroj

### 2.1. Estraro

La estraro konsistis en 2025 el:
Marc van Oostendorp, prezidanto, reelektita en 2025;
Loes Demmendaal, kasisto, demisiis dum la jarkunveno de la 10-a de majo 2025; kiel nova kasisto estis elektita Kees Neeft;
Rob Groeneveld, sekretario;
Ineke Emmelkamp, estrarano pri informado;
Peter van Noorden, estrarano, reelektita en 2025.
La estraro kunvenis 9 fojojn, 8-foje per Zoom kaj 1-foje fizike en Utrecht.
Okazis multaj kontaktoj per retmesaĝoj kaj Vacapo (WhatsApp).
Esperanto Nederland havas pagitan konton ĉe Zoom. La estraro kaj la organizantoj de la Amsterdama Rondo ĝin uzas. Bert de Wit uzas ĝin por interretaj kursoj.

### 2.2. Privacybeleid Esperanto Nederland

La teksto pri la politiko rilate privatajn aferojn troviĝas en la retejo de Esperanto Nederland.

### 2.3. Membrokunveno

La 34-a ĝenerala kunveno okazis la 10-an de majo en De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht.

### 2.4. Membroj

La administradon de membroj prizorgas Koos Scharroo. Li sendas bonvenigan paketon al novaj membroj, disponigas aktualan adresaron al la ekspedisto, kiu dissendas Fenikson, kaj informas la estraron kaj redakcion de Fenikso pri ŝanĝoj en la membraro.

Laŭmende li havigas publikan membroliston al membroj, prefere en cifereca form pro mediprotektaj kialoj.

**LEDENBESTAND ESPERANTO NEDERLAND 2025**

| MUTATIES | AANTAL | |
|---|---|---|
| STAND 1-1-2025 | 220 | |
| NIEUWE LEDEN | 12 | |
| OPZEGGINGEN, ROYEMENTEN | -16 | |
| OVERLEDEN | -9 | |
| STAND 31-12-2025 | 207 | |
| | | |
| LEEFTIJDEN | AANTAL | % |
| < 30 JAAR | 8 | 3,9 |
| 30 T/M 69 JAAR | 109 | 52,7 |
| ≥70 JAAR | 88 | 42,5 |
| GEEN OPGAVE | 2 | 1,0 |

## 3. Aliaj asociaj aferoj

### 3.1. Kaskontrolo

La kaskontrola komisiono konsistis el Mariska de Jonge kaj Peter Ebenau. Rezerva membro estis Ronaldo Nobel.

### 3.2. Arbitracia komisiono

Anneke Schouten-Buijs kaj Hiddo Velsink estas membroj ĝis 2028. Johan Swenker estas membro ĝis 2026.
En la jaro 2025 ne necesis agi.

### 3.3. Arkivo Esperanto Nederland – Internacia Instituto por Socia Historio (IISG)

En la Agadraporto pri 2024 mi menciis intencon kontakti en la onta jaro la – tiam novan – oficiston kiu respondecas pri Esperanto-arkivo ĉe IISG. Tio – pro diversaj personaj kialoj – ne realiĝis. Tamen, intertempe mi ricevis diversajn objektojn kiuj estas interesaj por la historio. Tio signifas ke en la jaro 2026 eblas transdoni al IISG kelkajn dokumentojn. Pri tio vi legos en la Agadraporto 2026.
*Raportas Ans Bakker-ten Hagen*

### 3.4. Komerca Ĉambro

La asocio estas oficiale registrita kun numero 40538656 ĉe la Komerca Ĉambro ("Kamer van Koophandel", www.kvk.nl), kiu krom entreprenojn por industrio aŭ komerco ankaŭ registras asociojn kaj fondaĵojn. La registriĝo estas senpaga. La registriĝo inkluzivas la estraranojn kun iliaj postenoj.

### 3.5. Verloren van Themaatpremio

Ĉi tiu premio povas esti aljuĝita al persono kiu dum la pasinta jaro publikigis aŭ igis publikigi la plej bonajn informojn pri la lingva problemo kaj/aŭ Esperanto en landaj, regionaj, lokaj aŭ sociaj medioj.

En 2025 la premio estis aljuĝita al la muzikduo Kajto (Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer). Pliaj informoj aperis en la protokolo de la 34-a Ĝenerala Kunveno.

## 4. Informado

**4.1.** En 2025 mi ne ricevis tiom da petoj por paperaj informiloj. Entute estis 21 (en 2024: 34). Kial? Mi ne scias. Eble ĉiuj trovis la deziratajn informojn en nia nova retejo? Aliflanke: du el ili partoprenis studosemajnfinon kaj unu nun vizitadas la klubkunvenojn en Groningen kaj planas veni al la maja studosemajnfino 2026.
La broŝuro 'Esperanto – zo op zak' preskaŭ elĉerpiĝis. La eldonisto Ralph Schmeits (La Fontano) preparas novan eldonon kun novaj desegnaĵoj en ĝi.

### 4.2. Foiro de Lingvoj en Leiden

Esperanto Nederland ricevis inviton partopreni en Foiro de Lingvoj, kiu okazis en Leiden. La instigo por la foiro estas la Tago de la Lingvoj, la 26-an de septembro. Ĉi-jare la organizanto de la foiro, Jan van Oosten, decidis kunlabori kun simila okazaĵo pri lingvoj en la sama tago en Leiden, unuafoje organizita de la fakultato por humanaj sciencoj. Estis prelegoj kaj laborsesioj pri multaj lingvoj. Federico Gobbo en kunlaboro kun Rob Groeneveld prizorgis informtablon dum tiu ĉi vespero. Mi zorgis ke Federico Gobbo ricevis informmaterialon por disdoni surloke.

### 4.3. Lingva festo en Utrecht

La 11-an de oktobro okazis Lingva Festo en Utrecht, organizita de 'Onze Taal'. Hiddo Velsink, Frank van Hertrooij, Marc van Oostendorp kaj mi prizorgis informbudon. Ni disdonis multajn informilojn kaj montris diversajn Esperanto-librojn. Unu vizitanto surloke anoncis ke li fariĝas membro. Restantan materialon mi metis en la libro-budon en la trajnstacio Utrecht, kie preterpasantoj senpage povas preni ĝin.

### 4.4. Informado en Groningen

Mi zorgis ke du projektoj en Groningen ricevis informilojn. Temas pri la projekto pri la novaj Esperanto-stratoj (Esperanto-tunelo kaj Esperanto-pado).
Alia projekto *Rabbels Hoop* temis pri la libro Vila Mano, en 1928 verkita de H.J. Bulthuis. Estas libro originale verkita en Esperanto, tradukita en la nederlandan lingvon: 'De taveerne van Piet Rabbel'. Prezentoj okazis en Warffum kaj en Groningen-urbo. Al Utrecht kaj Warffum mi kunportis la grandajn starantajn informilojn.
*Raportas Ineke Emmelkamp*

## 5. Instruado

### 5.1. La Katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo

La Universitata kurso de Esperanto de la akademia jaro 2024-2025 okazis regule; trapasis la ekzamenon 9 studentoj, ĉar 3 forlasis la kurson pro kalendaraj problemoj. Unu studento estis nederlanda, la ceteraj venis el EU. Studentoj estis informitaj pri ĉiaj agadoj en Esperantujo, aparte pri la studsemajnfinoj de Esperanto Nederland kaj la retumaj, hibridaj, kaj ĉeestaj agadoj de TEJO. Aparte notindas, ke du studentoj el Italio kontaktis la lokajn esperantistojn. Studenta pritaksado de la kurso estis 4,5 el 5, simile al la antaŭaj jaroj.

Tra la tuta 2025 realiĝis la ideo malfermi Erasmus+an interŝanĝon BIP (tuthibrida lernado, angle Blended Integrated Learning) havante la fenomenon Esperanto en la centro. Partoprenas multaj universitatoj tra Eŭropo (de Gent en Belgio al Bukareŝto en Rumanio ĝis Istambulo en Turkio) kies studentoj studas la lingvon rete dum la monatoj januaro - majo, kaj kunvenos en Turo, Francio, dum intensa semajno en

junio. La Universitato de Amsterdamo partoprenas per 10 studentoj; tio estas la plej alta nombro da partoprenantaj studentoj, danke al la eksterordinara nombro da kandidatoj, t.e. 17. Ĉi-akademia jaro 2025-2026 la Universitato de Amsterdamo jubileas 75 jarojn de Esperanto-instruado, kio estas unikaĵo en la mondo. Speciala vespero okazis ĉe la Societo De Witte en Hago post invito de la Plurlingva Tablo, pri la kontrasto inter lokaj kaj tutmondaj aspektoj de la Esperanta fenomeno. Poste aperis artikolo en la bulteno De Witteblad.

Menciindas, ke la interna raporto de la esplorcentro ACLC laŭdis la multajn agadojn de la katedrulo tra la jaro(j). Plendetala Jarraporto estis sendita porkone al la Estraro de Esperanto Nederland post ĝia aprobo fare de la Kuratorio, al kiu ĝi estis sendita en 2025-01-09.

*Raportas la katedrulo prof-ro d-ro Federico Gobbo*

### 5.2. Studosemajnfinoj

En 2025 denove okazis du sukcesaj studosemajnfinoj. La renkontiĝejo estis, kiel kutime, la naturamika domo Krikkenhaar apud Almelo. Ĝi disponas sufiĉe da ĉambroj por havigi privatecon kaj kvieton al pluraj leciongrupoj samtempe, kiel ankaŭ bonan kuirejon, dormĉambrojn kaj aliajn oportunaĵojn.
Al la aprila kaj novembra aranĝoj aliĝis respektive 32 kaj 28 lernantoj. Ni proponis lecionojn je kvin niveloj, de komencantoj ĝis fluparolantoj. Tamen bedaŭrinde en novembro mankis lernantoj en la grupo de komencantoj. Instruis Rob Groeneveld, Roel Haveman, Bert de Wit, Piet Glorieux, Yves Nevelsteen, Marc van Oostendorp, Fransuaz Balza kaj Federico Gobbo.
Interesa fakto estas ke unu el la komencantoj de aprilo studis Esperanton kun la specifa intenco fari pri ĝi podkaston. Tiu podkasto poste aperis kaj estis reklamata en la nacia radio.
La organiza teamo de la studosemajnfino jam de pluraj jaroj restas sama. Ineke Emmelkamp okupiĝas ĉefe pri reklamado, aliĝoj kaj loĝigo, Lilian van der Burgt estras la kuirejon, kaj Arjen-Sjoerd de Vries kunordigas la instruan programon. Krome Marieke de Haas estas regula kunlaboranto en la kuirejo.
Defioj por la estonteco estas daŭre la financa bonfarto de la aranĝoj, kaj engaĝo de novaj instruistoj kaj organizantoj.
*Raportas Arjen-Sjoerd de Vries*

### 5.3. Kursoj

Per ZOOM Bert de Wit instruas grupon de progresantoj kiuj ŝatas plibonigi sian paroladon de Esperanto. Ni kunvenis 11-foje. La ZOOM-kunvenoj okazis en la lunda vespero, de la 19.30a horo ĝis la 21a horo. Partoprenis 5 ĝis 8 personoj. La kutimo estas ke se kursanoj volas rakonti ion, ili povas ensendi la rakonton kaj ni priparolos ĝin. Tamen, ĉiam la kursanoj ricevas tekston kun demandoj kaj bildojn el bildrakonto aŭ filmeto. Poste, Bert resendas la korektitajn taskojn.
Jam dum 20 jaroj Koos Scharroo prizorgas kurson por komencantoj en la retejo Pingveno.nl. Kursanoj sendas la faritajn ekzercojn, kiujn Koos korektas. Intertempe ĉ. 350 homoj eklernis. Pluraj sukcesis kaj fariĝis entuziasmaj esperantistoj.

## 6. Fenikso

Kvin numeroj de Fenikso estis publikigitaj en 2025. La redaktoroj Paweł Fischer-Kotowski kaj Thijs van Viegen prizorgis ilin. La lasta revuo de la jaro ampleksis du numerojn: 5/6. Papere tiuj ĉi revuoj estis senditaj al la membroj. Fenikso estis sendita ciferece al pluraj adresoj en- kaj eksterlande. Unu monaton post apero ĝi estis ankaŭ metita en la retejon de Esperanto Nederland.

La gazeton presis kaj forsendis Flandra Esperanto Ligo en Antverpeno (Belgio).
*Raportas Rob Groeneveld*

## 7. Interreto

### 7.1. Nova retejo Esperanto Nederland

Dimanĉe la 9-an de februaro je la 13:00-a horo, dum La Amsterdama Rondo, la nova retejo estis prezentita al la vasta publiko. Retejo kun bela aspekto, belaj freŝaj koloroj kaj butono por elekti inter la nederlanda lingvo kaj Esperanto. Malantaŭ la kulisoj streĉa laboro okazis por tion realigi. Dankon pro tio al diversaj personoj. Ekde dimanĉo la 9-a de februaro Foppe-Klaas Hovinga, Ineke Emmelkamp, Evelien Rook kaj mi komencis la prizorgon de la retejo. Rinus Loof-van Overmeeren estas ĉiam preta helpi per sia teknika scio. Meze de novembro al nia grupo aliĝis Ronald van Buuren kaj Rianne Sanders. Evelien anoncis ke ŝi ĉesigos sian redaktan laboron en januari de ĉi tiu jaro.
Nia laboro konsistas ĉefe en la metado en la retejon de informoj de la estraro kaj de novaĵoj. Multaj novaĵoj temas pri Esperanto-kunvenoj. Ni ankaŭ tradukas nederlandlingvajn tekstojn en Esperanton kaj inverse kaj publikigas Fenikson en la retejon.
*Raportas Tonnie van Kessel*

### 7.2. Sociaj komunikiloj

La sociaj komunikiloj de Esperanto Nederland konsistas el: Fejsbuka paĝo, Ikso (X)-konto, Jutuba kaj Telegrama kanaloj. Ni publikigis tie anoncojn, raportojn kaj fotojn pri Esperanto-aranĝoj en Nederlando kaj la plej interesajn novaĵojn pri internaciaj Esperanto-eventoj en kiuj ĉeestas esperantistoj el Nederlando. Administrantoj de la sociaj komunikiloj estas Andries Hovinga kaj Joost Franssen. Kunlaboris Ineke Emmelkamp.
*Raportas Ineke Emmelkamp*

## 8. Universala Esperanto-Asocio

Dum la jaro 2025 ni ne havis komitatanon A ĉe UEA. Ni ne trovis novan kandidaton.

## 9. Nederlanda Grupo de Geinstruistoj Esperantistaj (NGGE)

NGGE, krom fako de Esperanto Nederland ankaŭ landa asocio de ILEI, celas informi instruantojn de Esperanto.
Bedaŭrind en 2025 forpasis du aktivuloj de NGGE, nome Simon Smits kaj Rob Moerbeek.

## 10. Regionaj memstaraj grupoj

Grupo de esperantistoj povas unuiĝi kaj sekve iri al notario por ekhavi juran staton kiel asocio (laŭ nederlanda juro: ‘vereniging’). Lokaj grupoj, formalaj aŭ neformalaj, ne estas sekcioj de Esperanto Nederland, sed organizaĵoj kiuj estas ankaŭ finance memstaraj. Esperanto Nederland kunlaboras kaj subtenas ĉi tiajn grupojn.

### 10.1. Alkmaar

La estraro konsistas el:
S-ino Tiny Droge, prezidanto, kiu demisios en 2026 kaj estas reelektabla; s-ino Margot Koopmans, vic-prezidanto, kiu demisios en 2027; s-ro John Droge, kasisto kiu demisios en 2028. La estraro kunvenis 10 fojojn.

**La kluba vivo**
Ni kunvenis en la kvartaldomo de Alkenhorst, salono Kiekendief.
Meznombro da partoprenantoj: 5 personoj.
**La nombro de membroj** Je la 31-an de decembro 2025: 17.

**Klubkunvenoj:** 7 foje.
**Malvo**
Nia ĥoro Malvo konsistis el 8 gemembroj, inkluzive la dirigentinon Marijke Lathouwers.
De septembro ’24 ni ne kunkantis.
Nuntempe ni kun**manĝas** kaj kune kantas duonan horon poste.
**La kluba bulteno:**
Fromaĝoklośo nuntempe estas publikigata en nia propra retejo ekde 2024, prizorgita de Stefan Terpstra.
Vidu: https://www.fromagokloso.nl
**Propagando:**
De Alkenhorst mencias nin, kiel Esperanto-klubon, en sia retejo.

**Temo de niaj kunvenoj:**

**La 20-an de januaro:** tradukado de tekstoj por la promenado tra Alkmaar dum la kultura tago
**La 17-an de februaro:** Jarkunveno, La kasisto prezentis la financan jarraporton. Poste: ludi esperantlingvajn ludojn.
**La 17-an de marto:** serĉi vortojn kun prefikso kaj sufikso, kiujn ni uzos en ludo
**La 28-an de aprilo:** elekti 3 aŭ pli proverbojn kaj jam elpensi kaj skribi malgrandajn rakontojn kiuj konvenas al la proverboj. La titolo estu la proverbo en Esperanto.
**La 29-an de aŭgusto**: kradrostado en presejĝardeno.
**La 16-an de septembro**: Ni kunprenis fermitan skatolon en kiun ni metis iun objekton, ni poste rakontis kial ni elektis ĉi tiun objekton, sed unue ni devis diveni kio estas en la skatolo.
**La 21-an de oktobro**: prepari ion pri ‘bunta’ persono el via ĉirkaŭaĵo, el historio, naturo aŭ kulturo.
**La 17-an de novembro:** ludis Anaso-ludon
**La 18-an de decembro:** Ni festis **la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof**.

**Speciala granda aktiveco la 14-a de junio:**
La estraro kun kelkaj membroj organizis kulturan tagon laŭ peto de Esperanto Nederland. En De Sociëteit, alloga 19-a-jarcenta konstruaĵo, ni prezentis belan kaj interesan programon. La programo komenciĝis je la 10:30h kaj daŭris ĝis la 17:00h. Post eniro kun kafo/teo estis bonveno kaj parolo de la skabeno pri kulturo. Tiam ni komencis promenadon en 3 grupoj tra la malnova urbocentro. Sekvis bona tagmanĝo ĉe De Sociëteit, post kiu oni povis provi la ludojn. Kun plena stomako oni vizitis muzeon de elekto: la Fromaĝmuzeon aŭ la muzeon de la Biero. Ni fermis la tagon per malnovaj kaj novaj kantoj kaj agrablaj konversacioj. Estis almenaŭ 40 partoprenantoj, kaj 30 el ili partoprenis komunan indonezian manĝon en De Sociëteit. Estis tre sukcesa tago!!
*Raportas Tiny Droge*
(vidu ankaŭ la artikolon pri la kultura tago en Alkmaar en Fenikso n-ro 4, julio-aŭgusto 2025)

### 10.2. Esperanto Klubo Eindhoven (EKE)
Ni kunvenis 10 fojojn en De Uitwijk en Eindhoven.
Ĉiam la 3-an merkredon de la monato, escepte de julio kaj aŭgusto.
Kiel kutime ni ludis skrablon en januaro, festis la Zamenhof-feston en decembro kaj parolis pri la ferioj en septembro. Cetere Monique prelegis pri Karnavalo en februaro,

ni legis tonditajn rakontojn en aprilo. Giulio prelegis pri skoltismo en majo. Ni parolis pri (niaj plej ŝatataj) libroj, kiujn ni legis, en junio. En oktobro ni ludis la (Esperantigitan de Rob) ludon FLUKSS. Kaj en novembro ni kune faris tekston de kanto sur konata muziko de fama Nederlanda artisto.
Ankaŭ ĉi-jare, ni ordigis nian ŝrankon kaj disdonis multe da libroj. Restas ankoraŭ du skatoloj. Ni volas doni la librojn al ĉiuj kiuj volas ilin havi kaj prizorgi.
Averaĝe ni estis kun 4 ĝis 6 personoj.
Membroj de nia klubo partoprenis interalie jenajn eventojn:

- GeBeneluksa kongreso (Schleiden-Gemünd, Germanio)
- Kokolores (Altena, DE)
- Kultura tago (Alkmaar, NL)
- Studsemajnfino (Bornerbroek, NL)
- Studsemajnfino (Ieper, BE)
- Universala kongreso (Brno,Ĉeĥio)
- KKPS (Gemert, NL)
- Zamenhoftago (Antverpeno, BE)
- Giulio vizitis la kulturan centron en Herzberg am Harz
- Ĝenerala Kunveno Esperanto Nederland Utreĥto

*Raportas An Olijslagers*

### 10.3. Esperanto-grupo Noord-Nederland

La 31-an de decembro 2025 ni havas 23 membrojn, inkluzive honoran membron sinjorinon Wil van Ganswijk. Invitojn por kunvenoj ricevas ne nur la membroj sed ankaŭ ĉ. 14 aliaj kiuj loĝas en la norda parto de Nederlando.
Ineke Emmelkamp fariĝis sekretario kaj kasisto. Andries Hovinga fariĝis prezidanto. Ni kunvenas unu fojon monate. Ineke prizorgas la datojn. La kunvenoj okazis en ŝia hejmo. Ne plu estas Zoom-kunvenoj.

Estis du gravaj projektoj.

La unua estis la budo kiun ni prizorgis en la nova parko Zuiderplantsoen. Tie jam estis Esperanto-strato, sed ekde septembro ankaŭ Esperanto-tunelo kaj Esperanto-pado. Ĉe la oficiala malfermo ni havis budon. Ineke faris longan, plastikan, informilon pri Esperanto. Pluraj membroj helpis aŭ vizitis la budon.

La dua estis la projekto Rabbels Hoop pri la verkisto Bulthuis, kiu naskiĝis en Warffum. Lenny Bulthuis, ne-esperantisto nek parenco de H.J.Bulthuis, planis ĉion en la kadro de provinca projekto. Estis Esperanto-agado en du bazlernejoj. Promeno tra la vilaĝo Warffum kie oni voĉlegis nederlandlingve kaj esperante frazojn el la libro La Vila Mano. Virĥoro el Warffum kantis kelkajn kantojn en Esperanto. Arjen-Sjoerd de Vries helpis en la tradukado. La Esperanto-kantgrupo Kajto prizorgis kantatelieron. Fine okazis bela pupteatra prezento, fare de Joeso Peters (1990).
Johan Swenker, Andries Hovinga kaj Harm Voortman helpis.
La pupteatra prezento okazis poste en la Grandtheatre en la urbo Groningen mem. Ineke prizorgis tie denove informbudon pri Esperanto kaj ekspozicion pri la verkoj de Bulthuis.
*Raportas Ineke Emmelkamp*

### 10.4. La Amsterdama Rondo

La raporto pri la agado de La Amsterdama Rondo jam aperis en Fenikso n-ro 1 de januari-februaro 2026 sur paĝo 10.

### 10.5. Zutfena Esperanto-Klubo

En 2025 ni, kiel la Zutfena Esperanto-Klubo, plurfoje kunvenis en la biblioteko de Zutphen. Ni interparolis pri diversaj temoj, ekzemple pri limoj, pri la mondo kaj pri tio, kiel ni ricevis niajn nomojn. La kunvenoj ĉiam estis agrablaj kaj ĝuetosaj.
La 28-an de junio 2025 Pieter Engwirda ĉeestis la klubon por la lasta fojo. La 13-an de aŭgusto 2025 li forpasis. Ni kune ĉeestis lian entombigon. Dum la jaroj kelkaj homoj aliĝis al la klubo, sed ankaŭ foriris.
Ĉar ni estas nur malgranda grupo, ni pro malsanoj kaj aliaj devontigoj de la membroj kelkfoje devis nuligi la kunvenon. Vintre ne por ĉiuj estas facile vojaĝi al Zutphen. Tial ni pridiskutis ĉu, kaj en kia formo, ni volas daŭrigi la klubon. Jan Nouwen kaj mi ellaboris proponon por organizi pli ol nur la regulajn klubkunvenojn. Ĉi-jare ni esploros ĉu ni povas realigi tion. Ni planis kunveni ne nur fizike, sed ankaŭ rete. Kelkfoje ni jam kunvenis pere de Google Meet.
*Raportas Foppe-Klaas Hovinga*

## 11. Diversaĵoj

### 11.1. Internacia Esperanto-Instituto (IEI)

La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) organizis Tagon en Hago la 3-an de majo. Kelkaj membroj de Esperanto Nederland partoprenis. Inter alie okazis vizito al Panoramo Mesdag.

**Kompilis Rob Groeneveld, sekretario**

La 4-an de aprilo 2026.

Tagordo punkto 7.2

| No. | | Buĝeto 2025 | Rezulto 2025 |
|---|---|---|---|
| **Enspezoj:** | | | |
| 1.1 | Rentumo | 1.000 | 1.041,50 |
| 1.2 | Kotizoj | 8.000 | 8.624,50 |
| 1.3 | Donacoj | 1.500 | 3.087,89 |
| 1.5 | Aliaj enspezoj (komisiaj vendoj ktp) | 30 | 23,35 |
| | **Sumoj enspezoj:** | **10.530** | **12.777,24** |
| **Elspezoj:** | | | |
| 1.8 | Bankkostoj | 300 | 274,47 |
| 2.1 | Estraraj kostoj | 670 | 453,37 |
| 2.2 | Reprezentado | 50 | - |
| 2.3 | Membrokunveno | 550 | 323,55 |
| 2.4 | Kostoj membroadministrado | 220 | 197,38 |
| 2.5 | Arkivo (IISG) | 600 | 600,00 |
| 2.6 | Biblioteko UVA | 0 | - |
| 3 | Verloren van Themaatpremio | 250 | 250,00 |
| 4 | Informado | 650 | 722,35 |
| 5.1 | Katedro UvA | 2.000 | 2.000,00 |
| 5.2 | Studosemajnfinoj: saldo | 0 | 279,00 |
| 6 | Fenikso | 5.500 | 3.851,44 |
| 7 | Retejo Esperanto Nederland | 265 | 72,45 |
| 8.1 | UEA (Aligitaj membroj) | 220 | 232,36 |
| 8.2 | Komitatano-A (UEA) | 0 | - |
| 11 | Mabesoone (Regionaj agadoj): LAR | 300 | 433,56 |
| 13.1 | Junularo | 0 | - |
| 14.1 | Landaj renkontiĝoj | 0 | -308,80 |
| 15 | Ne-atenditaj aferoj + div. elspezoj | 200 | |
| | **Sumo de la elspezoj** | **11.775** | **9.381,13** |
| | **Rezultato** | **-1.245** | **3.396,11** Pozitiva |

**Klarigoj rezulto 2025**

2.1 La estraro ĉefe kunsidas per Zoom

3 La Verloren van Themaatpremio iris al Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer

5.1 Pro kvinjara promeso

5.2 Deficito printempe € 102,72; aŭtune € 176,28

6 Fenikso aperis nur 4 fojojn

8.2 Ni daŭre ne havas komitatanon A (reprezentanto de Esperanto Nederland) ĉe UEA

14.1 La kultura tago en Alkmaar havis pozitivan rezulton.

Tagordo punkto 7.3

**Bilanco Esperanto Nederland 31-12-2025**

| **Aktivoj** | | Pasivoj | | |
|---|---|---|---|---|
| Antaŭpagitaj kostoj | 1.638,12 | Kapitalo je 1-1-2025 | 86.442,38 | |
| ASN konto | 77.321,34 | Kresko de la kapitalo | 3.396,11 | |
| Triodos kuranta | 3.359,00 | Kapitalo je 31-12-2025 | 89.838,49 | |
| Triodos Rendement | 20.000,00 | Kreditoroj | 0,00 | |
| UEA konto: devas esti 39,52 | -54,08 | Antaŭricevitaj rimedoj / aliaj | 30,40 | (Subvencio) membreco UEA |
| Ricevotaj rimedoj: korekto farota de UEA | 93,60 | Pagotaj kostoj | 0,00 | |
| Stokoj informado | 886,00 | Kotizoj 2026 | 363,50 | |
| | | Studsemajnfino 2026 | 150,00 | |
| | | Katedro Amsterdam 2019-2028 | 9.861,59 | |
| | | Helpfonduso studosemajnfinoj | 1.500,00 | Por nederlandanoj kun financaj problemoj |
| | | Helpfonduso kulturaj aktivaĵoj | 1.500,00 | |
| **Sumo de la aktivoj** | **103.243,98** | **Sumo de la pasivoj** | **103.243,98** | |

| **Katedro Amsterdam 2019 - 2028** | | | **Sume** |
|---|---|---|---|
| Enspezoj 2017 | 6.176,00 | | |
| Enspezoj 2018 | 4.594,00 | | |
| Enspezoj 2019 | 4.454,00 | | |
| Enspezoj 2020 | 4.654,00 | | |
| Enspezoj 2021 | 5.254,00 | | |
| Enspezoj 2022 | 6.245,59 | | |
| Enspezoj 2023 | 4.804,00 | | |
| Enspezoj 2024 | 5.054,00 | | |
| Enspezoj 2025 | 4.762,00 | | |
| Elspezoj 2019 | | -4.762,00 | |
| Elspezoj 2020 | | -4.762,00 | |
| Elspezoj 2021 | | -4.762,00 | |
| Elspezoj 2022 | | -5.500,00 | |
| Elspezoj 2023 | | -6.500,00 | |
| Elspezoj 2024 | | -4.800,00 | |
| Elspezoj 2025 | | -5.050,00 | |
| | **45.997,59** | **-36.136,00** | **9.861,59** |

**En 2025 donacis por la katedro:**

Ans Bakker - ten Hagen
Loes Demmendaal
Marjet Erasmus
Rob Moerbeek
BW

Tagordo punkto 8.2

| No. | | Akceptita Propono buĝeto 2026 | Propono buĝeto 2027 |
|---|---|---|---|
| **Enspezoj:** | | | |
| 1.1 | Rentumo | 1.000 | 1.000 |
| 1.2 | Kotizoj | 8.180 | 8.500 |
| 1.3 | Donacoj | 500 | 1.500 |
| 1.4 | Legaco | 0 | 0 |
| 1.5 | Aliaj enspezoj (komisiaj vendoj ktp) | 30 | 30 |
| | **Sumoj de la enspezoj:** | **9.710** | **11.030** |
| **Elspezoj:** | | | |
| 1.6 | Bankkostoj | 320 | 300 |
| 2.1 | Estraraj kostoj | 670 | 670 |
| 2.2 | Reprezentado | 50 | 50 |
| 2.3 | Membrokunveno | 550 | 550 |
| 2.4 | Kostoj membroadministrado | 220 | 220 |
| 2.5 | Arkivo (IISG) | 600 | 600 |
| 2.6 | Biblioteko UVA | 0 | 0 |
| 3 | Verloren van Themaatpremio | 50 | 50 |
| 4 | Informado | 650 | 650 |
| 5.1 | Katedro UvA | 2.000 | 2.000 |
| 5.2 | Studsemajnfino saldo | 0 | 0 |
| 6 | Fenikso | 5.500 | 5.500 |
| 7 | Retejo Esperanto Nederland | 265 | 265 |
| 8.1 | UEA (Aligitaj membroj) | 220 | 220 |
| 8.2 | Komitatano-A (UEA) | 0 | 0 |
| 11 | Mabesoone (Regionaj agadoj) | 300 | 300 |
| 13.1 | Junularo | 0 | 0 |
| 14.1 | Landaj renkontiĝoj | 0 | 0 |
| 15 | Ne-atenditaj aferoj + div. elspezoj | 200 | 200 |
| | **Sumo de la elspezoj** | **11.595** | **11.575** |
| | **Rezulto** | **-1.885** | **-545** |

Rimarko:
4. (post)farenda amortizo de la Stoko (€ 886) 2/5 >  €354

Tagordo punkto 8.3

**Beleidsplan 2026 – 2031**

Activiteiten van Esperanto Nederland voor de komende jaren.

De komende jaren blijft de vereniging Esperanto Nederland zich bezighouden met zaken waar we sterk in zijn, zoals het bij elkaar brengen van leden en andere mensen die geïnteresseerd zijn in het Esperanto, en informatievoorziening via onder andere Fenikso en de website. Daarnaast proberen we onder andere onze zichtbaarheid voor het onderwijs te versterken.

Dit zijn de hoofdpunten

1. Informatie verstrekken
2. Onderwijs
3. Bijeenkomsten
4. Contacten met andere organisaties
5. Interne organisatie

Deze punten worden hieronder nader uitgewerkt:

**1. Informatie verstrekken over het Esperanto en de Esperanto-beweging**

1.1 De uitgave van een tweetalig verenigingsblad voor interne en externe informatieverspreiding
1.2 Via internet (website, sociale media) informatie verspreiden over de internationale taal en de activiteiten van Esperanto Nederland.
1.3 Het attenderen van scholen en andere geïnteresseerde organisaties op de mogelijkheid om een (basis)presentatie over Esperanto aan te vragen.
1.4 Het inspelen op actuele situaties en de pers en andere geïnteresseerden voorzien van betrouwbare en actuele informatie.

**2. Onderwijs**

2.1 Het attenderen via de website van Esperanto Nederland op de mogelijkheid van internetcursussen zoals Pingveno.nl, Lernu.net, Edukado.net en Duolingo.com.
2.2 Het stimuleren en faciliteren van Nederlandstalige beginnerscursussen (bijvoorbeeld online)
2.3 Het tweemaal per jaar organiseren van studieweekeinden van beginners en gevorderden. Het doel is om hen in de gelegenheid stellen om Esperanto te leren en in een kleine groep het spreken van de taal te oefenen. De cursisten krijgen tevens een idee van de internationale Esperantocultuur.
2.4. Het materieel en geestelijk ondersteunen van de activiteiten van de leerstoel Interlinguïstiek en Esperanto aan de Universiteit van Amsterdam.

**3. Bijeenkomsten**

3.1 Het organiseren van een jaarlijkse culturele dag op een steeds wisselende locatie.
3.2 Het ondersteunen van plaatselijke bijeenkomsten, zoals die van La Amsterdama Rondo.
3.3 Het organiseren van een jaarvergadering waar ook een algemeen cultureel en informatief randje aan zit.

**4. Contacten met andere organisaties**

Esperanto Nederland onderhoudt contacten met organisaties die van betekenis zijn voor de informatie over de taal Esperanto en voor de Esperanto-beweging, zoals:

4.1 Het Nederlandse UNESCO-centrum.
4.2 Nederlandse culturele organisaties en personen die geïnteresseerd zijn in aan de doelstellingen van de vereniging verwante thema's.
4.3 Organisatoren van talenfestivals of festivals van polyglotten.
4.4 Organisaties die zich met taalpolitiek en mensenrechten bezighouden, o.m. de positie van minderheidstalen.
4.5. Andere Esperanto-organisaties zoals
(a) de Wereld Esperantovereniging (UEA) in Rotterdam,
(b) het Internationaal Esperanto-Instituut (IEI) in Den Haag,
(c) de Nederlandse Esperanto-jeugd (NEJ),
(d) lokale Esperanto-verenigingen in Nederland,
(e) de Europese Esperanto Unie (EEU),
(f) andere landelijke Esperanto-verenigingen, met name in Duitsland en België,
(g) ILEI (de internationale onderwijsbond).

**5. Interne organisatie**

5.1 Het bestuur komt ongeveer maandelijks bijeen, meestal online.
5.2 Een jaarvergadering voor alle leden in de eerste helft van het jaar, in Utrecht.
5.3 De vereniging zoekt andere manieren om naast de uitgave van Fenikso, leden onderling met elkaar in contact te houden.
5.4 De vereniging kent jaarlijks een Verloren van Themaat-mediaprijs voor iemand die het Esperanto onder de aandacht van een breder publiek heeft gebracht.